

Apogu Esperanton en la Eŭropa Unio

La Eŭropa Unio (EU) konferencas por ellabori gvidliniojn por plia evoluo. Kadre de la konferenco la eŭropunia civitanaro estas invitata proponi kaj diskuti ideojn, kiamaniere EU evoluu. Temas ankaŭ pri lingvopolitikaj demandoj rilate al la lingva reĝimo de EU (komuna lingvo, lingva egalrajteco, instruado de lingvoj en lernejoj ktp.).

Daŭre ĝisdatigitaj informoj pri la EU-Konferenco kaj la tiurilata kampanjo de la Komisiono por eŭropa agado de UEA kaj Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) troviĝas en la **UEA-vikipaĝo** <https://mallonge.net/uea-eeu>

Gravas, ke esperantistoj ekapogas por-esperantajn proponojn ...

...ĝis komenco de oktobro 2021!

Se por-esperantaj proponoj ricevas **grandnombran apogon** en la eŭropunia debata platformo, niaj organizoj (UEA, EEU, landaj asocioj) povos pli sukcespromese dialogi kun reprezentantoj de EU-instancoj, kiam tiuj preparas la decidojn pri realigotaj ideoj.

Via apogo plej efike utilas ĝis komenco de oktobro 2021, ĉar tiam komencos la traktado de civitanaj proponoj.

Aparte apoginda propono

Bonvolu apogi **tiun** proponon, kiun UEA/EEU taksas kiel **aparte promesplenan**:

- **The EU needs improved language learning**
(*Proponas grandskalan projekton pri Multlingva Akcelilo en lernejoj*)
<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/23893>

... kaj pliaj apogindaj proponoj

Se vi apogis la supran UEA/EEU-proponon, bonvolu konsideri **ankaŭ** apogi tiujn proponojn, se vi konsentas kun ili:

- **Esperanto, a common and neutral language, designed to be easy to learn. A new tool for a more united European Union.**
(*E-o, komuna kaj neŭtrala lingvo, facile lernebla = nova ilo por pli unuiĝinta EU*)
<https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/5399>

Atento! Se malfacilas/ne eblas voĉdoni por tiu propono (pro teknikaj kialoj), sekvu la procedon, kiun priskribas la blogero: <https://mallonge.net/solvo5399>

- **Taalonderwijs in Europa**
(*Enkonduko de E-o en lernejojn*)
<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/260>

- **Official recognition of Esperanto as one of the languages of EU citizens**
(*Agnosko de E-o kiel unu el la lingvoj de EU-civitanoj*)
<https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/17955>
- **Cantare l'inno europeo in una lingua comune**
(*Kanti la eŭropan himnon en E-o je oficialaj eŭropuniaj eventoj*)
<https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/50429>

Kelkaj konsiloj

Vi ne nur povas apogi por-esperantan proponon (**nepre faru tion!**): ankaŭ eblas komenti tiajn proponojn. Uzu tiun eblecon saĝe, indas atenti kelkajn konsilojn!

- Skribu laŭeble ne tro multajn komentojn. Nia celgrupo, la membroj de la civitana paneloj, kiuj pritraktos, diskutos kaj decidos pri proponoj, devos okupiĝi pri centoj da proponoj. Ju pli konciza kaj trafa via komento, des pli pozitive ĝi influos la akcepton de la propono.
*Krome ni rimarkis, ke ŝajne proponoj kun multnombraj, longaj komentoj suferas je **teknikaj problemoj** (supozeble ligitaj al la multlingveco kaj aŭtomata tradukado en la platformo): eĉ ne plu eblas simple voĉdoni por ili! Ni evitu tion en niaj proponoj, do eble komentu iomete malpli ofte kaj ĉiam laŭeble koncize.*
- Pripensu ke la celgrupo de niaj proponoj kaj komentoj ne estas niaj samideanoj. Ne skribu en Esperanto!
- Ne donu lingvajn aŭ historiajn lecionojn pri nia lingvo. Sufiĉas doni ligilon al bona fonto (retpaĝo) por scivolemaj ne-esperantistoj.

Teknikaĵoj: registriĝo

Por apogi por-esperantajn proponojn necesas registriĝi. Jen konciza priskribo.

Je via unua aliro al la retejo de la civitana platformo <https://futureu.europa.eu>:

- elektu vian lingvon el la 24 oficialaj lingvoj de EU (ne, bedaŭrinde Esperanto ne jam estas inter ili)
- alklaku la ligilon „Ensaluti“ dekstre de la eŭropunia flago
- en la paĝo de „EU Login“ alklaku „**Krei novan uzantkonton**“
- plenigu ĉiujn kampojn, inkluzive la „kodon“: necesas entajpi la signojn (literojn kaj ciferojn) afiŝitajn en la kaptila bildo („captcha“). Se tio malfacile legeblas, alklaku la trilateran sagon > supra la bildo (sub „entajpu la kodon“): sintetika voĉo laŭlegas (en la lingvo, kiun vi elektis) la afiŝitan kodon. Aŭ alklaku la duoblan, kurbitan sagon por afiŝi novan kaptilan bildon, espereble pli bone distingeblan. Foje pluraj provoj estas necesaj, ne malkuraĝiĝu! Atento: **uskleco gravas** je la kodo.
- Laste, alklaku la plej malsupran kampon „Krei novan uzantkonton“.

Vi ricevos mesaĝon al la retpoŝtadreso, kiun vi ĵus registris. Atendu tiun mesaĝon kaj alklaku la ligilon en ĝi. Vi nun devas elekti vian pasvorton. Atentu pri la kondiĉoj, kiujn la pasvorto nepre plenumu: longeco almenaŭ 10 signoj, kaj ĝi devas ankaŭ plenumi almenaŭ tri el kvar afiŝitaj kondiĉoj.

Je via unua eniro vi vidos demandaron. Vi **ne devas respondi** la demandojn, simple alklaku, ke vi ne deziras respondi ilin. Aŭ respondu nur kelkajn, laŭ via deziro.

Kaze de teknikaj problemoj skribu al la suba diskutlisto aŭ al Klaus Leith: KDL@gmx.eu

Pliaj informoj? Ĉu vie emas plie kunlabori en la kampanjo?

Pri la kampanjo daŭre informas [UEA-vikipaĝo \(https://mallonge.net/uea-eeu\)](https://mallonge.net/uea-eeu).

Aliĝu al la tiurilata [diskutlisto \(https://groups.io/g/EU-estonteco-konferenco\)](https://groups.io/g/EU-estonteco-konferenco), kie ni organizas la kunlaboron dum la kampanjo.